

# Novaj Libroj

Duope ricevitajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

\*) ricevebla ĉe U.E.A.

**STUPOJ SEN NOMO\*** de Baldur Ragnarsson. *Prologo de J. Régulo Pérez. Dekoracioj de Pablo Picasso. Kovrilo de John Hartley. Vinjeto de Mads Stage. Stafeto: Beletraj Kajeroj 1. 19 x 12 cm. 128 paĝoj. Prezo: 4.— gld.; 16 steloj.*

El Islando, kie esperantisto trovas sin pli sola ol eĉ en aliaj eŭropaj landoj; kie malpli dika tavolo de teknologio kaj pseŭdocivilizo protektas la sensojn kaj koron kontraŭ la beleco kaj minaco de la nehoma kosmo; kie la pejzaĝoj estas nudaj, drastaj kaj ofte similaj al la terursonĝoj de alilandaj artistoj, nun venas libreto kiu kelkloke ŝiras kiel norda vento, kiu impresas forte kaj kiu maltrankviligas la menson.

Sed, en la nuna mondo, la menso ne rajtas postuli trankvilecon kaj la koro ne evitos ŝiriĝon: se kelkloke la klinge drastaj poemoj de Baldur Ragnarsson sangigas la trafiton, oni rememoru, ke kadavroj ne sangas. Ragnarsson, plenkonscia pri nia mortemo kaj pri nia nuna kapablo mortigi la mondon, atentigas nin pri nia vivanteco, pri respondeco kaj pri ia supera valideco de amo kaj intelekto. Li bele ekzempligas tiun faman diron de *Pascal*, ke la homo estas nur pensanta fragmito — sed kiam la universo mortigas lin, la homo restas pli granda ol la tuta universo, ĉar la homo scias ke li mortas. Ni ŝuldas dankon al Ragnarsson, ĉar li memorigas nin pri la grandeco de la homo.

Tion li faras, ne nur per la enhavo de siaj profundaj, pensigaj poemoj, sed ankaŭ per ilia estetika beleco: tre videble li estas artisto serioza, dediĉita. *Koncentriĝo*, diris la usona-brita imagista skolo, kiu siatempe multe forbalais tedajn banalecojn el la angla poezio kaj preparis la vojon por novaj kremetodoj, estas la esenca eco de la poezio. Se oni opinias, kiel mi, ke tiu ĉi frazo esprimas gravan preskaŭveraĵon, oni trovos, kiel mi, intensegan estetikon plezuron (kelkfoje eĉ korpe tremigan aŭ korbatiĝan) ĉe la poemoj de Ragnarsson.

La libro konsistas el tri ŝtupoj; antaŭ ĉiu ŝtupo la tremanta koro ricevas stimulan injekcion: desegnon infanstan de Picasso, kiu memorigas nin pri la konsterna vizikapablo de kelkaj infanaj psikoj, pri la miranta infano

kiu restas en la artista psiko. (La redaktoro ja meritas gratulon, ĉar li kaperis tiajn raraĵojn por la esperantistoj).

La unua "ŝtupo" enhavas dudek-du poemojn, inter kiuj troviĝas nenio banala, enua aŭ neartisma, kaj kelkaj poemoj miaopinie perfektaj. Ragnarsson verŝajne multe influigis per du temoj de la nuntempa scienco: spacovojaĝado kaj nukleaj armiloj. Laŭ mia gusto, unu el la plej belaj poemoj en la libro estas la soneto: "De Ter' sendita penta esplorist'" pri la spacovojaĝanto, kiu neniam atingas planedon sufiĉe frue, por malhelpi la krucumadon de la tiea Kristo. Kolosa koncepto, bildigita per vortoj ege potencaj. Kaj en la vizia poemo:

*"Finosortas  
sur la Tero,  
fajro krakas,  
tondras fero . . . ."*

Ragnarsson laŭ la martelanta ritmo de la *Dies Irae* memorigas nin pri nia ebla tuthomara memmortigo. Jen unu el liaj neforgeseblaj bildoj:

*"Ludon lasis  
l'infaneto,  
solas pilkoj  
sen priĵeto."*

Tiu tenere kortuŝa sugestia bildo pri la morto de infanoj ankaŭ ironie sugestias la "pilkojn" kiujn tielnomite "maturaj" homoj kapablas tiel facilanime ĵeti . . . . la nukleajn bombojn.

Mi ne nomus Ragnarsson pesimisma; li estas nur realisma. Li ŝajnas iom obsedita per nia mortemo; sed en mortigema mondo; kaj nenies vivkoncepto povas esti plenkura, ĝis li plenkonscias pri la morto. Inter la poemoj de la Unua Ŝtupo, ni vidas, ke homa amo estas ne nur la konsolo:

*"La solan sankton for de  
l'mondorgi'  
mi trovas en brakum'  
de sola Ŝi."*

sed ankaŭ la granda esperigilo kaj edukilo:

*"Ekruĝas mia vango,  
se krudas ago via,  
sed fidon mi ne perdas  
pri mondo familia,  
ĉar legas mi konsole  
en la okuloj puraj  
de mia filo kara  
pri ecoj dinaturaj."*

"Rilatoj vir-virinaj tial estas ĝermo de nova superaĵo de ĉiel' malfermo" kvankam la homoj pli ol la bestoj kapablas suferi pro amo. Kun fileto antaŭ la kovejo — en unu el la plej belaj poemoj de la volumo — Ragnarsson trovas la tutecon kaj unuecon de la vivo:

*"Lanuge mola nia kokinido  
la tagon strabas en fiera fido:  
en mi la Kosmo sin spegulas  
certe,  
en mia esto tuta mondvalido."*

La poemoj de la Dua Ŝtupo ne havas la saman tuje sensofrapan belecon; feliĉo malĉeestas; sango, nigro kaj krueleco eĉ pli konstante regas; kaj multaj el la poemoj estas malpli rapide kompreneblaj. Sed pliprofundigas la intenseco de la artismo. Kian neforgeseblan bildon donas nova poemo pri nuklea mondfino, kiam la poeto bildigas mortantojn, kies lastaj rigardoj ironie trafas la planedon, Venuŝon! Tre konciza estas la simbolo, sen gloso, sen banaliga substreko; sed, unufoje plenkaptite per la menso, tiu ĉi simbolo resumas la tutan tragedion de la homa historio.

La homo estas krucumita per la "isma devo" — du vortoj resumas la tutan kruelecon de ideologioj. La neĝo povas "cigni krudosubon".

*"Treme, sur mensofundo  
sub splenoblok' atendas  
en mutokrampoj la poem."*

Tiaj koncizaĵoj tre plaĉas per sia trafeco. La terursonĝo (p. 68), la celŝpirado (p. 70), la subita percepto pri mortemo dum malagrabra promeno (p. 73), la misteraj ironioj de niaj lacecoj inter farendaj taskoj (p. 74), la senkoherigo de pasio (p. 83) simile ekzempligas tiun animoskuan intensecon, kiu karakterizas la poemojn de Ragnarsson. Li mem kelkfoje sentis la tenton eviti veran pensadon, travivadon de siaj propraj vizioj:

*"Timas antaŭ fremdo mi,  
precipe nigroduma,  
tiri min al ŝirma lok'  
ja tiam tentas plej . . . ."*

sed li scias, ke la ĝisfunda esplorado de sia mallumo povas esti vojo al saĝo:

*"Ĉar sombrokisoj tiaj  
kaj voĉo fride fantoma,  
estas limogardistoj  
de regno eksterhoma."*

En la plej "malfacilaj" poemoj, oni rimarkos oftege tiun talenton pri la belege trafa kaj konciza frazeto, tiun perfektecon el intenseco forĝitan, kiu estas tiel elstare karakteriza de la poeto: li vidas:

*"flugilrompitan sunon  
trakuri arde super la tegmento,  
eskapi rande mian fumotubon  
kaj fali maron . . . ."*

"Sur mensa Gibraltaro  
enua estas mia gardostaro".

"luno silenta  
kiu kalvakape fendis  
plumaron de l'nuboj"

"palpoj krepuskaj  
de orfa pensaro . . ."

"Al la trafiko de mia sango  
tra l'oscedaj vejnoj  
mankas ruĝaj lumoj."

"De mia koro  
ĝis mia cerbo  
senvoja spac'."

La lasta poemo impresas kiel nigre  
pesimisma; sed la lastaj vortoj de tiu  
ĉi malgranda unua volumo estas

"sen fino"

— sen punkto. Se nunmomente la tri  
ŝtupoj de Ragnarsson kondukas nin  
nur al la rando de abismo, ni ne for-  
gesu, ke tiu relative juna artisto an-

koraŭ ne finkonstruis sian ŝtuparon.  
Vera talento ĉiam anagramas latento;  
kaj mi atendas, ke tiu ĉi iom izolita,  
tre individueca Esperanta verkisto el  
fora Islando (fora de ĉiuj . . .) iam  
iĝos avangardisto je la plej alta senco:  
li antaŭen kaj supren kondukos mul-  
tajn el ni, estetike kaj pense. Li jam  
purigis sin de ripetemo, imitemo, ba-  
naleco, flatemo al la publiko. Mi, kiu  
tro bone scias, kiel malfacile estas  
venki tiajn tentojn, sentas fortan fi-  
don, ke Ragnarsson la homo baldaŭ  
trovos la artistan plenumon de sia jam  
videbla humaneco kaj reala progrese-  
mo; ke Ragnarsson la artisto jam  
brulpurigis por si mem vastan kam-  
pon, sur kiu iam aperos riĉega rikolto.

Dume, ni aĉetu lian unuan volumon,  
ekstere belan kiel ĉiuj *Stafeto-pre-*  
*sitaĵoj*; ĝi jam estas trezoro tragika,  
kaj neforgeseble montras la potencon  
kaj plastikecon de nia lingvo.

MARJORIE BOULTON

## Novaj Broŝuroj

La trafikoficejo en Berlino eldonis  
faldfolion "Berlino de hodiaŭ", kiu  
estas havebla ĉe: La Trafikoficejo,  
Berlin 82, Berlin-Charlottenborg  
Fasanenstr. 7/8, Germanujo.



La SYNDICAT D'INITIATIVE,  
Korto de la Klostro, eldonis belan  
faldfolion pri la Muzeo en Vienne en  
Delfinio, Francujo.



En diversaj lingvoj — ankaŭ en  
Esperanto — La Norvega Trafikoficejo  
eldonis multkoloran vojaĝmapeton:  
"Al Danlando kaj la Kontinento". Ĝi  
estas havebla ĉe: A/S Larvik-Frede-  
rikshavnferjen, P.O. Box 2443, Oslo

# Belartaj Konkursoj 1960

Sekcio : Originala poezio

Unua premio

## ROMANCO F-MAJORA DE BEETHOVEN

*La majvesper' al ĝi kulisas . . .  
En mia ĉambro nigriĝanta  
viziti venas min plej granda  
el majstroj kaj la belo glisas  
tra vespera hor'.*

*La arĉ' kantigas violonon  
rakonti pri sopir' tenera  
kaj trafas ĝia sorĉ' konkera  
eĉ vin, trinkanta artodonon  
ho soifa kor'.*

*Sur plankon de malhela ĉambro  
transcenda mano ĵetis rozon,  
mi aŭskultante virtuozon  
flaras, ke bonodoras ambro,  
spiras roza flor'.*

*La strata lampo pentras ombre  
sur ĉambra vando bildojn strangajn,  
mens' mia flustras vortojn dankajn  
al muta mask' pendanta sombre  
en titana glor'.*

Jiři Kořinek, Brno, Ĉeĥoslovakio

Dua premio

## AL ALTAJ TATROJ

El ebenajo altiĝantaj ŝtonmirakloj :  
vin sube ĉirkaŭringas akvoj, supre agloj.

Per pintoj kiel fiŝojn kaptas vi la nubojn.  
Tre ofte, dissterninte la nebulojupojn  
trompŝercas, ŝajnigante, ke vi ne ekzistas.  
Tuj poste, forĵetinte ilin, vi ne plu rezistas  
al homrigard', nudecon vian avidanta . . . .  
Nur venu, venu, ho amanto diletanta:  
elektu mortospecon, ardan rekompencan  
pro amotuŝoj! . . . . Ne toleros ĉi atencan  
Vestaloj vi fieraj de jarmilionoj,  
smeralde mar-okulaj log-medalioj!

Vir' en Giganta Akvofal' sin volis duŝi?  
bonvolis vi kompleze lin sub r o k o n puŝi :  
li eterniĝis kun okuloj mirigitaj;  
ili sur fotoj eĉ nun brilas morton spitaj . . . .  
Eksentas vi junulon vantajn kaj blasfeman?  
deskrapos lin : formikon rampe konkereman;  
lavange superŝutos per granitkitelo  
kaj zorge kovros per ermena neĝmantelo.  
Ĉar dum piedoj viaj dancas en sunlumo.  
hararoj viaj? — vip' de ŝtormo-frenezumo!!!

Vin plugas glaciejoj, trempas pluvindoj,  
bruligas sunofrapoj, fendas frostovundojn  
jam de pratempe. Tamen ĉiam des pli belaj  
eĉ sen haŭteroj vi fariĝas. Nur ribelaj  
vi restas. Sed jam ĉesis via monopolo :  
salutojn kaj minacojn sendi al la Foro!  
/Floraro, faŭno per instinkt' sin tenas vive  
pereus Hom', kredante al instinkt' naive :  
science ekipita viajn sorĉojn kribras;  
palpiloj liaj jam en Universo vibras! /

Sed nin ne timu: feblajn mortokandidatojn  
indulgu nin, renversu la kondamnajn fatojn.  
Ne volu nin vi per sovaĝa venĝo buĉi:  
el molaj mamoj lasu novan vivon suĉi!!  
Al plena resaniĝo donu sunan gracon  
kaj al popoloj niaj — poreternan pacon!!! . . .

Ludoviko Izák, Martin, Ĉeĥoslovakio.